

Manfred Hausmann,

Adoro

tradukita de Manfred Retzlaff

Kun nia reĝpotenco ni
alrajdis pezakore.
Tag-nokte neĝis ti ĉi,
dum venis ni defore.

En la kabanon iras ni
infanon ekvidante,
nin klinas antaŭ tiu ĉi,
la manojn kunfaldante.

La mirho estas tie ĉi,
la or' kaj olibano.
Ridetas vi, konfuzas vi
nin tute, ho infano.

Alian ni ja kredis vin.
Ni iras en malhelon,
de l' kapo ni deprenas ĝin,
de l' krono oran belon.

Ja ĉion, kion scias ni,
la tutan homan scion,
ne gravas tio ja por ni,
forgesu ni ĉi tion!

La mio, kiu kreis sin²
supere de aliaj,
ho, kie ni nun trovu ĝin,
ĉu en internoj niaj?

Ni klinas nin nun antaŭ vi,
kun affikteco nia.
Kaj nin klinante sentas ni:
Mizer' finiĝas ĉia.

Jen skuas la ĉevaloj sin
tintante sonorile.
Sen bruo falas super ĝin
neĝflokaj tre trankvile.

...

²aŭ:

La "mi" kreinta iam sin

*Traduko de la Germana poemo “Anbetung” de MANFRED HAUSMANN (*1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-952-1921 (2014-01-10 16:21:40)